Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 10-a de Januaro 2022

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Inbar Mor, Ŝaj Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel (fizike); Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi (zome). Gasto: Stanisław (Pollando).

***Protokolo** de la pasinta (decembra) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigita.*

1. Raportoj

a) La du novaj estraranoj estas bonvenitaj kaj salutataj (Inbar Mor kaj Ŝaj Mor – sen parenceco)
b) Propono: malnetaĵo de la protokolo estu sendita al ĉiuj estraranoj. Ĉies aldonoj kaj ***korektoj*** (ĝis nun ĉefe Amri, parte Ŝlomo) – ***estu sendataj al Gabi*** kiu kunmetos kaj plusendos al Jehoŝua por fina formulado; li siavice sendos al Dror por publikigo. ***Unuanime akceptita!***
c) **Amri**: la lastan kunvenon pri la spac-teleskopo Webb partoprenis ĉ. 50 personoj (plejparte zome el eksterlando). En la jutub-kanalo aldoniĝis pliaj 80 spektantoj. UEA laŭdis ĝin kaj ev-e mencios ĝin en publikigo pri la planita "Jaro de Lidja".
ĉ) Ŝaj rakontis pri sia aperonta libro.

2. Tasko-dividoj en la Estraro (Jehoŝua)

Jehoŝua (prezidanto, ĉefdelegito de UEA), Amri (eksteraj rilatoj, Komitatatano A por Israelo, Israela Kongreso), Mikaelo (vicprezidanto, redaktoro de IE, kulturaj aferoj), Ŝlomo (kasisto), Gabi (protokoloj), Dror (la retejo de ELI, interreto), Eran (konsultanto pri financoj), Avigail (kontaktoj kun la membroj), Inbar (junularo), Ŝaj (E-Vikipedio).

3. Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Ĉeestis fizike nur 18 partoprenantoj, prezidis Judith Epstein. Estis taŭga arta programo, nur Amir Naor prelegis zome, kio teknike funkciis bone. Estis iuj miskomprenoj, el kiuj sekvis ia senordo en la programo, eĉ ofendiĝoj. Ni devas adekvate instrukcii la prezidontojn de la kunvenoj por tiujn plibonigi.

4. La estonto de la klubo Josi Ŝemer (Amri)

Amri: la luado de la klubejo en Bejt-WIZO kostas al ni 280 NIS por ĉiu kunveno, kiun partoprenadis dum la lastaj monatoj ĉ. 5-10 samideanoj. Mi proponas kunveni zome 3 fojojn monate kaj unufoje fizike/hibride en Alon-turo. La loko estas sufiĉe centra, taŭgas por nemultaj homoj, la retkontakto estas sufiĉe bona, kaj ni ŝparos monon.
Jehoŝua: La pandemio kaŭzis plurajn damaĝojn; ni devas prepari nin por rekunvenadi fizike!
Amri: Estis lokaloj antaŭ WIZO kaj estos ankaŭ poste. **Voĉdono** pri la supra propono: *7 por, Jehoŝua sindetenas.*
Jehoŝua: mi devas avizi al Bejt-WIZO, ke provizore (pro la koronvirusa reĝimo) ni ne uzos ilian salonon. Nia membraro ricevos adekvatan avizon pere de ***ELI-Listo***.

2/…

5. <u>Dratwerejo</u> (Amri)
Estas problemoj pri la tuboj; la tubisto petas 300 NIS por la riparo. La riparo de ĵaluzioj kostos 300 NIS x 3 = 900 NIS. **Voĉdono**: *la elspezo estas unuanime aprobita!* [Posta komento de Amri: efektive la ĵaluzioj kostis nur 400 kune].

6. <u>Financoj</u> (Ŝlomo)
a) Ĉiuj ricevis rete la buĝet-plenumon de 2021 kontraŭ la planado – sed nur ĝis Septembro; mi ĝustigos ĝis la fino de la jaro, kaj dissendos.
b) **Ŝlomo** daŭrigos la serĉojn pri magazeno por nia libraro –ni havas 100 mil siklojn por la magazeno. **Ŝlomo**: kiom da libroj ni havas? **Jehoŝua** taksas, ke entute ĉ. 3,000 – 5,000 librojn.

7. <u>Oficejo</u> (Amri)
a) **Amri**: Bar Vardi, kiu provas luigi nian oficejon, diras, ke potencialaj luantoj plendas pri du malavantaĝoj: (1) La "muro" inter ĝi kaj la najbara oficejo estas travidebla glaso (kio estas riparebla – mi petis prez-oferton); (2) Vid-al-vide estas la necesejo– pri kio Bar diris, ke estas planoj aldoni necesejon kaj ĉeokaze ŝanĝi la situon.
b) La antaŭa luantino, adv. Ĥagit, verŝajne ne plu interesiĝas pri reluado.

8. <u>*Israela Esperantisto*</u> (Mikaelo)
Jehoŝua: la novaj korektitaj etikedoj estos baldaŭ sendotaj al Mikaelo.

La venonta kunsido: lunde, la 7-an de Februaro 2022, je 20:00
(en Alon-turo, fizike kaj zome)

***Protokolis**:* Gabi Zeevi